7-a JARO, N-o 334



LEIPZIG, 26. / 2. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

Faŝista politiko en la "Libera urbo Dancig"

Tuj post la parlament-balotoj dekstruloj agitis por "modela" Senato.

Sed anstataŭ koncentriĝi, la gvidroluloj disiĝis en tiom da direktoj, kiom ekzistis. Ŝajne ĉiu volis en la nomo de diversaj partifrakcioj direkti laŭ propra egoista vidpunkto la procezon de l' Senat-formiĝo. Semajnojn daŭris tiu paraliza ĥaoso. Ĉefe la naci-socialistoj konfuzis ĉiun entreprenon, kiu iom servis al starigo de prudenta plano. Multvoĉe k malharmonie la reprezentantoj de ĉi tiu partio babiladis arogante k aliflanke kun ia humilo petis helpon ĉe la pli aĝaj german-naciaj fratoj pro sia noviceco.

Rezulte preskaŭ ĉiuj oficoj estas okupitaj de german-naciaj partianoj. Eĉ la ŝtatprezidanto, kiu prezidis depost la unuaj tagoj de l' ekzisto de la "Libera urbo Dancig", devis pro diversaj koalicioj transdoni sian postenon al alia, kiu obeeme plenumas ĉiun instrukcion de l' german-nacia partio k montras sin ankaŭ fidela kristano. Ĉi-okaze mi rimarkigu, ke senescepte ĉiu senatano aldonis, kiam li ĵuris fidelon al la konstitucio, la vortojn: "kun bonvola helpo de dio", kvankam tia formulo leĝe nenecesas.

Eksprezidanto kostas al la urbo dum daŭro de du jaroj ĉiujare 48 000 guldenojn dancigajn (= ĉirkaŭ 40 000 germ. mk.) k poste ĝis la vivfino 40 000 guldenoj. Sed ne nur lin, ankaŭ aliajn senatanojn oni ne reelektis k anstataŭigis per alipartianoj. Tiuj senatanoj rajte k leĝe ricevas dumvivan pension. Aranĝo, kiu denove ŝarĝas la buĝeton per daŭra pluso de 1/4-miliono. Malaltigon de l' senatanaj salajroj konsentis nek ili nek la naci-socialistoj, kies unu balotpunkto estis tiu postulo.

La buĝeto provizore starigita sumiĝas je 12 milionoj da guldenoj (ĉ. 2,5 milionoj da dolaroj). Sed, laŭ takso k sperto de la pasinta jaro: multnombriĝo de l' senlaboruloj, sekve plia pago de ŝtata subteno k plia malaltiĝo de l' impostoj enspezataj el la salajro, konsekvence neaĉetpovo de multaj konsumantoj k ankaŭ la neceso importi varojn k sekve malpliiĝi la dogan-



Kran-pordego en Dancig

impostojn; per la nunaj metodoj oni ne tiom enspezos, por kovri la elspezojn. Nepra helprimedo devas esti trovata . . .

Kontraŭmarksista Senato trovas la solvon. Estas la aroganta proletaro, kiu per marksista laboro en partioj k sindikatoj preparas la ribelon k kiun necesas kontraŭbatali. Pro la ekonomia krizo la Senato asertas, ke necesas krei leĝon por ebligi al ŝtatkonservaj entreprenoj mem ellabori k validigi leĝojn, kiujn nur poste priparolu k sankciu la popola parlamento. Komence per tio estis celite malpliigi laŭgrade la ŝtatoficistajn salajrojn. Sed kiam la leĝo estis konfirmita, la reganta kontraŭmarksista koalicio forgesis sian promeson, sub la preteksto de konvencio kun germanaj ŝtat-oficistoj. Ĝi anstataŭe proponis krom-impostpagigi la ŝtatoficistojn.

Kontraŭpropono de socialistoj k komunistoj, laŭgrade fari la redukton en alto de 5—20%, estis malakceptata. La origina postulo estis eĉ ĝin fari ĝis 40%, sed ĝi devis esti reprenata, ĉar la nacisocialista "laborista" partio promesis fari similan proponon. La faŝistoj eĉ ne donis sian kontraŭproponon k ankaŭ ne subtenis socialdemokratojn k komunistojn ĉe la voĉdono. Tiel fariĝis leĝo egala por ĉiu kategorio pago de 8% da krom-impostoj (konstante okupataj oficistoj en komunumo k institucioj publik-rajtaj — de 6—7%). Por familiestro la impostlibera sumo estas 200 guld., por gefraŭloj 167 guld.

14 tagojn post sia formiĝo la Senato dekretis, ke ĉiu eĉ plej malgranda enspezo devas esti impostata per almenaŭ 1,10 guld. monate (ĝis nun restis 100 guld. por fraŭlo, 130 por edzo neimpostdevaj). Por geedzoj kun unu infano la impostlibera sumo estis 210 gd. monate. De nun ili pagos 4,40 gd. Ĝis nun ĉiu plia infano kaŭzis redukton de l' imposto. Tiu ĉi regulo ankaŭ malaperis. Tiel aspektas la protektantoj de familioj kun multaj infanoj por patri-defendo.

Samtempe fariĝas leĝo 10%-a altigo de l' nuna loĝej-lupago por komenco, kun konsento de l' "laborista" partio nacisocialista. La sumo ne estas uzata por konstrui novajn domojn. La loĝejoj estas mizeraj k laŭnombre tute malsufiĉaj.

La kontraŭmarksista Senato anonc-

as reorganizon de l' leĝo favore al kripluloj, vidvinoj k orfoj pro la mondmilito. Nerajte la diversaj subtenatoj ricevas la monon, ĉar ili aŭ la zorgantoj ja "libervole" iris defendi la patrion k devas nun esti tro fieraj por akcepti monon, kiu al ili tute ne apartenas...

Nacisocialistaj parlamentanoj konsentas la agojn de l' Senato malaltigi la subtenon por senlaboruloj, kiuj por ili estas mallaboremuloj. La nova organiza skemo antaŭvidas pli rapidan transkondukon de l' ŝtata senlaborula subteno al la komunuma subteno (almozpeto).

Ĉiu ĝisnuna ago de l' Senato estis kontraŭproleta. Kaj kvankam la nacisocialistoj malkuraĝe restis ekster la registara koalicio (formita el germannacianoj, katolikoj k liberaluloj), ili ebligas per siaj voĉoj la leĝ-malbonigojn por la laboristaro. Se tiuj "socialistoj" montrus sin vere laboristemaj, neniu leĝo povus trafi tiom profunde la laboristaron. La nomo "socialista laboristo" estas nur malhonorata de ili.

Per memklerigo, instruado al niaj familianoj k proksimuloj ni mondskale klopodu forigi tiun minacan danĝeron por ni k niaj posteuloj.

Koko (2421).

Kiu deziras havi ilustritan gvidilon tra Dancig k pri ĝia ŝtatjura pozicio, tiu povas ricevi ĝin ĉe Kurt Klaps, Karpfenseigen 12, *Dancig*, kontraŭ simila esp-aĵo aŭ resp. kupono.

SKLAVECO EN LA 20-a JARCENTO

(Fino. Vidu antaŭan n-on.)

La angla kolonia registaro ĝenerale estas pli humana rilate siajn decidojn pri la koloruloj, k ankaŭ ĝiaj metodoj por laborigi la indiĝenojn, estas pli homecaj ol la belgaj k francaj praktikoj.

Tial la plej multaj plendoj tiuokaze ankaŭ ne devenas el la kolonioj, sed el la mandat-regionoj k kolonioj kun memregado. En la angla parlamento delegito atentigis la deputitaron, ke sub la okuloj de la brita estraro en Sudano okazas vigla sklavokomerco. La sklavoj grandnombre estas transportataj el Abisenio al Sudano, kie ili devas punlabori en kotonplantejoj. La angla registaro konsentas, ke tie ĉi io ne estas en ordo, tamen deklaris per ĉiuj fortoj kontraŭbatali tion, kalkulante kun la moroj k kutimoj de la tiea loĝantaro.

Pli pripensigaj tamen estas la regantaj kondiĉoj en Brita Hindio. Laŭ la sciigoj de la neoficiala "Hinda Laborista Gazeto" estas tenataj en la hindaj princlandoj ankoraŭ multnombraj sklavoj, laŭ takso proksimume 200 mil.

La hindaj reĝoj disponas pri vivo k morto. La virinoj k filinoj de iliaj sklavoj estas disponeblaj por iliaj haremoj. Ankaŭ ili povas fordoni tiujn virinojn al aliuj. Krom tiuj sklavoj estas multe da hindoj el la malaltaj kastoj, kiuj devas fari punlaboron. Precipe la terkulturistoj ĉiel estas subpremataj. Ĉiam ili devas esti pretaj akompani sian mastron al la ĉasado aŭ plenumi laboron en la palacoj. Ili estas devigataj helpi sen iu ajn rekompenco en vojfarado, k de sia rikolto la plej bonan parton ili devas lasi al sia subpremanto. Tiu hom-malinda stato ja ekzistas nur en la duonmemstaraj vasalŝtatoj, kiuj nuntempe defendas la anglan politikon kontraŭ Gandi k liaj disĉiploj je la profito k ordono de siaj regnestroj. Ĉi tiuj do estas malmulte ĝenataj de la brita estraro k sentas sin plej bone en la nuntempaj cirkonstancoj. Pro tio Britio subtenas la sklavecon en tiuj ĉi ŝtatoj, dum la britaj guberniestroj ĉiel helpas la hindajn princojn koncerne tiun ĉi punkton.

Tiuj deklaroj estas nek atakitaj nek refutitaj dum la lasta ŝtatkonferenco en Londono de la brita ministro por kolonioj.

Tute aliaj estas la proporcioj en Sudafriko. Ĉi tie la koloruloj formis laborunuiĝojn, kiuj sukcese defendas la interesojn de la negroj. Oni ĉi tie bezonas grandan kvanton da laborfortoj por la ekspluatado al la or- k arĝentminejoj. Laŭ la sciigoj de la prezidanto de l' "Konsilantaro por ekspluatado al la Transvalaj minejoj", la laborproblemo nuntempe estas la plej kriza faktoro por la ekonomia situacio de la lando.

Oni bezonas almenaŭ 210 mil negrojn, tamen nun nur 180 mil koloruloj laboras en la minejoj. Tiu manko havas multajn kaŭzojn; la ĉefa kaŭzo estas la alta mort-elcento, sekve de la tie reganta ftizo, kiu precipe en la minejoj, kie la malsanĝermoj rapide sin disvastigas, kaptas viktimon post viktimo. Por malgraŭ tio havigi al si la bezonatajn laboristojn, la Sudafrika registaro decidis laborigi la negrojn el la nordaj distriktoj en la minejoj.

Ĉiu indiĝeno, kiu rifuzas subskribi la laborkontrakton, estas submetata al specialaj, premantaj impostoj. Kontraŭ la leĝoj, kiuj praktike nur signifas la reenkondukon de sklaveco, stariĝas ŝtormo da protestoj, ankaŭ el la vicoj de la blankuloj.

La laborunuiĝo, kiu nuntempe nombras pli ol dekmil membrojn, kuniĝis kun la laborunuiĝoj de la blankuloj por komune kontraŭbatali tiujn barbarajn leĝojn de la brita registaro. Kian grandegan amplekson jam atingis la ekscito k malkontento inter la negroj, pruvas la antaŭ nelonge prenita decido de la Ministro de Justo, en kiu estas sciigata, ke ĉiu persono, kiu kuraĝas estigi malkontenton inter la negroj pro la nuntempaj kondiĉoj, estas kondamnata je ekzilo. Same la gazetoj aŭ ĵurnaloj povas esti tuj malpermesataj k konfiskataj, se ili kritikas la regpolitikon rilate al negroj. Speciala tiucele starigita tribunalo havas la rajton tuj kondamni personojn suspektajn.

Plie leĝprojekto estas prezentita, per kiu ĉiuj negraj laboristoj-unuiĝoj estos nuligataj k ĉiu metiorganizado al la koloruloj estas malpermesata.

Sklaveco en la 20-a jarcento! Kiu pensis pri tio? Ankoraŭ ĉiam la negro estas rigardata kiel ŝarĝobesto k kiel malplivalorulo. Ankoraŭ ĉiam oni emas ekspluati lin korpe k spirite. Anstataŭ eduki, nobligi lin per instruado k fondado de lernejoj, tiuj koloruloj ankoraŭ ĉiam estas devigataj per baston- k vipofrapoj je forton konsumanta laboro, subpremataj k malestimataj, ĝis la morto ĉesigas ilian mizeron.

Ilia libero — la libero de la primitivulo — estas kruele prenata de ili; iliaj familioj estas disigataj, iliaj virinoj k infanoj vendataj... k tio ĉio ĉe la "civilizitaj" belgoj, francoj k angloj.

Laŭ Apeldorna gazeto esp-igis A. E. (15 700).

Ĉu faŝismo en Danio?

Pli k pli la itala faŝismo enpenetras ĉiujn landojn. Kiam ĝi tuj post la milito aperis, ni konsideris ĝin kiel izolan fenomenon, intime ligitan kun la naciaj karakterizoj de l' italoj. Sed iom post iom montriĝas, ke tio estas eraro. Kiel la parlamentismo respondas al la kapitalisma socio en la periodo de libera konkurenco, tiel la faŝismo evidentiĝas kiel la politika sistemo de l' plu-evoluinta kapitalismo, celanta al koncentriĝo, monopolismo.

Okazis diversaj provoj fondi faŝisman partion en Danio, la lasta estas la fondo de la Dana nacisocialista partio,

P. Kropotkin
ETIKO
VOLUMO DE 240 PAĜOJ
Entenas la altvalorajn moralsciencajn konsiderojn de la granda anarkista pensulo. Verko de ĉiama valoro.
Prezo: 1,80 mk. g.
Havebla ĉe Administrejo de SAT.

kiu estas formita laŭ germana modelo. Laŭ sia programo ĝi batalas kontraŭ la juda kapitalismo, kontraŭ la marksismo, kiu "servas nur por efektivigi la nacian sonĝon de l' judoj pri tutmonda supereco", por rashigieno ktp.

En ĝi ne estas ero da racio, k tiu partio certe povas varbi adeptojn nur inter akademianoj de plej malalta kvalito. Praktikan signifon ĝi povos havi nur en revolucia situacio, kiam la burĝaro supozeble povus interesiĝi pri financigo de nacisocialista partio laŭ Hitlera modelo.

La serioza dana faŝismo certe estos kamparana movado samkiel la finlanda. Ĉi-rilate jam troviĝas grandaj atentindaj organizoj. Unue ni citu la SOS-organizon (socia klerig-asocio). Ĝi estas organizo de l' grandfinancistaro k disponas pri grandaj monsumoj. Nur grandkapitalistoj povas aliĝi al ĝi, k tre sekrete en malnovaj bienoj okazas ĝiaj kunvenoj. Ĝia celo estas: batalo kontraŭ la socialismo, ne enmiksiĝante en la ĉiutaga politiko de la diversaj burĝaj partioj. Aliaj organizoj estas — la lim-asocioj, "socihelpo", parte la soldataj asocioj k la gimnastik- k pafist-unuiĝoj. Ĉiuj cititaj organizoj estas grandaj, ekonomie fortaj unuiĝoj kun faŝisma tendenco.

La faŝistoj ne imitis la grandan stultaĵon de la laboristoj: lasi sin senarmigi. Ili disponas pri grandaj korpusoj (akademia pafist-korpuso, reĝa elit-ĉasist-korpuso, la pafist-unuiĝoj k. m. a.), kiuj estas pretaj ĉiumomente kontraŭbatali la revolucieman laboristaron.

Multaj homoj eraras, kiuj rigardinte la malsukceson de l' nacisocialista partio, neas la ekziston de faŝismo en Danio (ekz. la ŝtatministro Staŭning). Sed fakte la faŝismo jam vigle floras ĉi tie, k ĝi facile povas iĝi tre danĝera realo. Precipe se la nuna kamparana krizo montriĝos sufiĉe longdaŭra k profunda, ekzistas ĉiuj ebloj por dana "lappo"-partio[1].

[1] Partio laŭ modelo de finlandaj faŝistoj (kamparanoj).

Parte laŭ skandinava "Mondo": H. Nilsen (11 082).

2 POPULAR-SCIENCAJ VERKOJ

kiuj konatigas vin per klara, facile komprenebla lingvo kun la atingoj de moderna fiziko k kemio:

EL LA MONDBILDO DE L' NOVA FIZIKO de D-ro Reiche; trad. Muravkin. 52 pĝ. 11×17 cm.

LA KEMIO DE LA UNIVERSO de akademiano Fersman, 80 pĝ. 11×14 cm. Ambaŭ libretoj estas eldonitaj de SAT. — Prezo po volumo: *0,60 mk. g.*

Adm. de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

VARB-KONKURSO

Ni alvokas la legantaron al granda konkur-varbado.

Ni fiksas tri premiojn por tiuj aktivuloj, kiuj ĝis la XI-a Kongreso de SAT varbas al "S-ulo" la plej multajn novajn abonantojn.

1-a premio: Senpaga jarabono al "S-ulo", al "La N. E." k jarkotizo al SAT, plus la "Plena Vortaro de Esperanto";

2-a premio: Senpaga jarabono al "S-ulo" k al "La N. E." plus "La Fera Kalkanumo";

3-a premio: Senpaga jarabono al "S-ulo" plus "Kandid".

Krome ĉiuj konkurs-partoprenantoj, kiuj sukcesos varbi pli ol 50 novajn abonantojn, ricevos la unuan premion dum 3 jaroj.

Por ke la varbantoj en malgrandaj lokoj, tre ofte izoluloj, ne rezignu dekomence je la partopreno en nia konkurso, ni promesas ankaŭ al tiuj abonigantoj surpriz-premiojn. Kiu abonigos eĉ nur 1, 2 aŭ 3 novajn esperantistojn, havos do la kontentigon ricevi senpage iun de SAT eldonitan broŝuron kiel surprizon. Tiel, ĉiuj varbantoj estos iel rekompencitaj en la fino de l' konkursdaŭro.

La abonoj estu farataj laŭ la povo de l' varbatoj: ĉu trimonata, sesmonata aŭ jara; gravas nur la nombro de l' varbitoj. Laŭmezure de l' varbado la mono samtempe estu sendata kun la listo de l' nomoj k adresoj de la varbitoj al la Administrejo kun indiko: Varbkonkurso al "S-ulo". Ĉi tiu indiko necesas por ĝusta kontrolo. De tempo al tempo aperos en "S-ulo" noto pri la stato de l' konkurso.

Listoj sen mono ne estas atentataj.

Antaŭen por la 1-a premio dum 3 jaroj!

Por klarigo: Ĉi-supra konkurso al varbado de abonantoj ne estas iniciatita de la Direkcio de SAT nek de la Redakcio de "S-ulo": la propono venas de iu K-do, kiu samtempe kun la projekto deponis ĉe ni la monsumon necesan por garantii per ĝi la pagon de l' premioj sen ia elspezo por SAT, esceptante la librojn.

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Ĉe la aŭstriaj faŝistoj

La t. n. "hejmdefenduloj", faŝistaj milicanoj en Aŭstrio, kiuj esperis preni la ŝtatregadon definitive en lasta jaro, tute fiaskis. Ili estas nun dividitaj en plurajn frakciojn, k eble tiu, kiu sekvas la princon Staremberg, ne estas eĉ la plej grava. La malbona finiĝo de l' elektoj por tiuj partioj rompis la faŝistan forton k samtempe ilian unuecon. Multaj reiris sub la ŝirmon de l' bienposedantoj, aliaj fariĝis nacisocialistoj kiel la Hitleranoj en Germanio. Sed la batalo daŭras inter la burĝa k klerikala ministraro unuflanke k la laboristaj amasoj aliflanke, kiuj estas minacataj per perdo se siaj akiritaj rajtoj k per premegantaj impostoj.

Md.

La evoluo de l' ĝenerala krizo en Germanio

La krizo en Germanio ne nur estas ekonomia, ĝi estas ankaŭ politika k socia. Ni vidis (la 10. feb.), ke la deputitoj de l' ekstrem-naciistaj partioj (hitleranoj k german-naciistoj) forlasis kun celo obstrukci la parlamentejon k solene deklaris rifuzi plue "kunlabori". Sed ne tie disvolviĝas la ĉefa batalo, kiu okazas inter la industria k bienposedanta oligarkio unuflanke k la treege suferanta proletaro aliflanke. La armeo da senlaboruloj ampleksas preskaŭ 5 milionojn da laboristoj, preskaŭ je duoblo pli ol ekzistas en Britio. La okupataj laboristoj laboras kun reduktitaj salajroj, kiuj malaltiĝis meze je 8—12%. Sed la plej granda entrepreno, la Ŝtalkartelo, pretendas trudi al siaj dungitoj eĉ malaltigon salajran de 20—25%. Se ĝi sukcesos, sekvos tuj la tuta pez-industrio. La tuta ekonomia k financa plano por resanigo estas bazita sur la sistema malaltigo de l' manlaboraj prezoj.

L. D. F.

Antaŭ la elektoj en Hispanio

Okazis la elektoj por la difino de l' membroj laboristaj en la t. n. "Comités paritarios" (labor-komitatoj konsistantaj el egala nombro da mastraj k laboristaj reprezentantoj) en Barcelono la 8-an de februaro. La kandidatoj prezentitaj de koalicio el katalunaj socialistoj k ruĝaj sindikatistoj triumfis kontraŭ la t. n. "liberaj sindikatoj", kiuj ne starigis liston. La ĉiunuancaj monarkistoj en Barcelono faris komunan kunvenon k decidis prezenti hispan-karakteran liston kontraŭ la regionistoj.

La en la Madridaj malliberejoj enkarcerigitaj komunistoj proklamis la

malsatstrikon (je 13. feb.) por protesti kontraŭ sia longdaŭra arestiteco. *P. M.*

La atak-taĉmentoj nacisocialistaj en Germanio

preskaŭ ĉiutage en tiu aŭ alia urbo de Germanio atakas (se ili estas je nombro superaj) grupojn de socialistoj (anoj de "Regna Standardo") k komunistoj. Policaj traserĉoj en la ĉef-oficejoj de l' stabo faŝista malkovrigis plej akuzajn dokumentojn k konfirmas la suspekton pri vera sekreta organizo por mortigo al politikaj kontraŭuloj. Krome la nacisocialista partio organizis ankaŭ la forkuron de murdintoj trans la landlimon. Montriĝas, ke inter la ŝtat-oficistoj troviĝas sufiĉe grava nombro da Hitleranoj, inter ili direktoro ĉe la ministerio por internaj aferoj, kiu liveris ĉiujn plej konfidencajn informojn al sia partio. Ĉi tiu persono nun estas eksigita el sia ofico k aperos antaŭ tribunalo. *132-A.*

Faŝista bomb-protesto en Belgio

La 12-an de februaro okazis du eksplodoj en la domo, en kiu troviĝas la Nacia Instituto por Radiodisvastigo, en Bruselo. Per tiu rimedo la faŝistoj volis esprimi sian proteston kontraŭ la aranĝoj de socialistaj radio-disaŭdigoj, en kiuj estas ankaŭ prezentata "La Internacio". Plurajn tagojn antaŭe jam la Instituto ricevis minac-leterojn, por ke la aranĝantoj ĉesigu ludi la batalhimnon de l' socialismo. *St-r.*

Hispanio — ĝia evoluo de 1923 ĝis hodiaŭ


(Fino. Vidu n-ojn 327, 330, 332, 333.)

Berenger agas laŭ alia metodo

La popolo ne plu estas tiel facile trompebla, ekribeloj ofte okazadas, la diktatoro devis elpensi novan metodon por trankviligi la amasojn. Berenger prezentis sin kiel demokrato: por fari sin simpatia al la popolo, li ekparolis iom malagrable kontraŭ la finita unua diktaturo; li asertis, ke lia regformo ne estas diktatur-karaktera, sed ke li nepre devas agi malrapide, zorgege, ĝis ĉiuj malbonoj estos forigitaj, kiujn kreis lia antaŭulo. Iom post iom li promesis doni liberon al ĉiuj ĝis okazigo de tutlanda baloto, en kiu la loĝantaro "libere" elektu siajn gvidontojn.

Komprenante, ke la popolo ne kontentiĝos pri promesoj, li malfermis al ĝi la okulojn pri la pereiga monsituacio pri la malbonstato, kiun kreis la diktaturo por la lando, k permesis ankaŭ iomete paroli pri tiuj aferoj, pri la ŝteladoj de l' antaŭaj ministroj. Laŭŝajne Berenger mem klopodis malkovri k konigi tiujn skandalojn; sed fakte tio estis nur ruzaĵo k nova trompmaniero: Berenger estas samklasano k estis amiko de Primo de Rivera; ambaŭ estis generaloj k inter ili k la reĝo oni interkonsentis, ke Berenger estu anstataŭanto de Primo, ke vulpo sekvu la lupon.

Subite ekaperis sur la politika scenejo la tre konata "martiro" de l' diktaturo, Sanchez-Guerra. Al kelkaj politikaj enkarcerigitoj Berenger ja permesis, kontraŭagante tiel la decidojn de l' antaŭa registaro, ĝui relativan liberon. Sanchez-Guerra, la iama ĉef-konspiranto kontraŭ la diktaturo, ankaŭ estis liberigata. Ĉi tiu fariĝis, malgraŭ sia ĉiama konservativemo, malgraŭ sia politika pasinto, vera popola



Sanchez-Guerra trompis la esperojn de l' popolo; li forĵetis post sia liberiĝo la revolucian maskon k montriĝas reĝofidela konstituciano

heroo. Precipe la meza klaso admiris lin kvazaŭ solan savanton.

Profitante tiun bonŝancan okazon, Sanchez-Guerra volis paroli al la popolo iom pri la estonto de Hispanio. Per tio kompreneble li deziris sole konservi sian bonegan famon, kiun la cirkonstancoj havigis al li; lia nura celo estis pretigi vojon al si por iam ... agi.

Por konigi siajn politikajn opiniojn al la loĝantaro, Sanchez-Guerra anoncis al la publiko, ke "li parolus volonte en granda teatro, se oni tion permesus al li". Kial do la tiel demokrata registaro malpermesus al Sanchez-Guerra publike paroladi? Sanchez-Guerra ja ne estas revoluciulo, sed nur tre bona antaŭvidanto. Li ekribelis kontraŭ la pereinta diktaturo ne pro sia malkonsento al ties terura agado, sed tial ke li ekvidis la neeblon teni tiun diktaturon k ekkonis la preparojn de l' popolo ĝin detrui. Tial Sanchez-Guerra sen la popola ribelo k nur kun helpo de tre burĝaj oficiroj kredis sin sufiĉe forta por ŝanĝi la registaron k silentigi la pretiĝantan popolon. Efektive Sanchez-Guerra estas reakciulo, kiu voĉdonis por la ekzekuto al Ferer (Ferrer), fondinto de l' modernaj lernejoj; li estis iam ĉefministro k dum ĝenerala striko en 1917 ordonis mortpafi proletojn, amase mortigis ilin en karceroj. Li estas sampartiano de Primo.

Do, Berenger jam permesis al li paroli en granda teatro, kien eniri pro la amasego da ĉeestantoj estis neebla. La ĵurnalistoj eĉ restis antaŭ la pordoj de l' teatro; la ejo pleniĝis je ĉefaj politikistoj. Ekstere la popolo interesiĝanta arde pri la opinio de Sanchez plenigis la ĉirkaŭajn stratojn.

Kion dirus Sanchez? Ĉu konservi la monarkion? Ĉu starigi respublikon? La amaso atendis maltrankvile la respondon. La plejmulto atendis, ke Sanchez fariĝos respublikano. Sed al la atendantoj respondis tiuj, kiuj eliris el la teatro: Sanchez Guerra estas perfidulo, li ne volas respublikon! "For Sanchez Guerra! for la reĝon! vivu la respubliko!" ekaŭdiĝis de ĉiuj flankoj la krioj; la amaso ekmoviĝis k marŝis tra la stratoj manifestaciante per laŭtaj krioj kontraŭ la reĝo k la perfiduloj, por la revolucio.

La manifestacio direktis sin al la reĝa palaco; hispankoloraj standardoj estis forprenataj de patri-unuiĝa oficejo k piedpremataj. Ruĝaj standardoj ekaperis ĉie; ili ondis sur la pintoj de bastonoj. La manifestaciantoj marŝis kuraĝe, sed la gvardianoj multobligitaj pafis ĉiudirekten, ili alvenis ĉevale k piedire. Tri tagojn daŭris la strataj bataloj kontraŭ la polico. Bedaŭrinde la popolo estis senarmila. Karceroj k policejoj plenpleniĝis, eĉ 21 junuloj ni estis en *unu* mallibereja ĉambro.

De tiam Berenger atentis, ke la proletaro ne plu amasiĝu. *(15 430)*

La XI-a SAT-Kongreso
okazos de 2.—7. aŭgusto 1931
en Amsterdam.



E. LANTI
FOR LA NEŬTRALISMON!
3-a eldono

Tiu ĉi broŝuro, kiu vidis jam la trian eldonon, difinis la pozicion de l' lab. esperantistoj post la mondmilito, montris al ili la ireblan vojon, instigis ilin organiziĝi en propra organizo. La saĝaj konsiloj k antaŭvidoj konservas ankoraŭ hodiaŭ sian valoron kiel antaŭ dek jaroj.

Prezo: 0.30 mk. g.

Havebla ĉe la Administracio:
R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27

LA KOLEKTIVIGO EN U.S.S.R. LAŬ FEDOR GLADKOV

(Fino. Vidu n-ojn 330, 331, 332, 333.)

La komuno "La ruĝa Moskvo"

Inter la senlimaj kampoj de la kolĥozoj, apud la bordoj de stepa rivereto, invadata de junkoj k salikoj, subite ardegas, superkreskanta k dika, la nepenetrebla verdaĵo de arboplena densaĵo. Sur monteto, kiu superstaras lageton, en la profundo de larĝa aleo staras grandega ŝtona domo. Estas la eksa bieno de riĉa kozako; la densaĵo estas la malnovega, vastega parko. Maljuna, solida baraĵo; la lago, spegulo, kiu reflektas pure la arbaron k la ĉiellazuron. Akva muelilo. Tiu landsinjora loĝejo, la parko, la herbobedo, la lageto, malzorgataj, iomete sovaĝaj, refaratai, memorigas la pentraĵojn de Jukovski. Estas la komuno "La ruĝa Moskvo". Malantaŭ la domo estas granda komuna loĝejo. Ĉirkaŭ la korto staras la ĉevalejo, la staloj, laborejoj, la forĝejo.

Jam de post 10 jaroj tiu komuno ekzistas. Ĝi konsistas el 150 personoj. Estas proksimume 800 hektaroj da terspaco. La elektita kultur-alternado okazas ĉiu-kvarjare.

K-do Klejmenov, sekretario de la regiona komitato, fieras pri tiu komuno: estas apoga punkto en la kun'glaboro inter la kampoj de plena kolektivigo. La komuno estas firma k fidinda.

Mi pensas pri aliaj komunoj. Mi memoras tiun, kiu nomiĝas "La Antaŭgvardio" en Ukrainio, k mi iomete ekmalĝojas. Ŝajnas al mi, ke "La ruĝa Moskvo" ne estas ankoraŭ bone organizita: laŭ la kultura vidpunkto, ĝi tute ne diferencas de la "stanicoj" k de la vilaĝetoj, kiuj ĉirkaŭas ĝin. La interesoj ne transpaŝas la ĉiutagajn aferojn de mallarĝa fako. Ne estas laŭ la kampara vidpunkto efektivigoj, kiuj povus esti citataj kiel ekzemplo al la kolĥozloĝantoj. Estas vere, ke apud tiu komuno ekzistas birdkorto k kuniklejo. Sed la kunikloj, kiel leporoj, disiris en la arbarojn, k de tempo al tempo oni kaptas kelkajn. Montriĝas klare, ke la diversrasaj kokinoj, anasoj, meleagrinoj, ne estas imitinde zorgataj. La kortobirdoj vagas en la arbetejo aŭ ovonaskas en specialaj ĉambroj, en kiuj oni povas kontroli ilian reprodukt-kapablon, sed en kiuj oni ne sin gardas kontraŭ la epidemioj, kiuj mortigas amase la junajn kovitarojn. La kolĥozloĝantoj povas do nenion ĉi tie lerni. Estas porkoj, kiuj ankaŭ suferas malsanojn k kies kulturado kaŭzas nur malprofitojn. Ĉie la maldiligento, la malpuro k, je vidpunkto de la vivkondiĉoj, la neprogreso. Neniu kuracisto; la malsanulvartisto loĝas malproksime k venas nur kiam li estas speciale alvokata. La agronomo ankaŭ montriĝas nur malofte. La komuno sin enfermas en sia propra mastrumado.

Neniom da infanet-gardejoj nek -ĝardenoj. La buboj estas malpuraj k duone senvestaj. Estas loĝantino de la komuno, kiu prizorgas ilin; ŝi estas malklera. Fakte la infanoj ne estas gardataj; ili baraktas en la korto, en la polvo; ili malpuriĝas; la suĉinfanoj suĉas siajn fingrojn. La pli grandaj ludas ie ajn; ili kroĉiĝas al la jupoj de la patrinoj, petolas, interdisputas, reciproke sin batas k iafoje sangas. Kelkaj havas bandaĝojn ĉirkaŭ la kruroj. Tamen, ne malproksime de la domo, eta pavilono estas aliigata en infangardejon. Sed oni ne pensas inviti frebelan[1] instruistinon; ĉio restas kiel dum la pasinta tempo; la sama malklerulino plue zorgadas pri la infanoj.

Nenia lernejo; la knabetoj vizitas tiun de la najbara vilaĝeto. La kultura laboro estas tre malvigle plivastigata; estas ruĝa angulo k eta biblioteko; sed tio ĉio estas mizera, senvalora.

Entute, oni celas nur servi al si mem. Tio povas certigi la solidon de la kolektiva vivo; sed, ĉar ne estas kultura gvidado, oni ne konstatas progresojn. Tiu komuno ne povas utili kiel ekzemplo por la ĉirkaŭa loĝantaro; ĝi ne estas kapabla influi la kolĥozloĝantojn, ilin instigi por ekspluati pli intense sian mastrumon.

La oficiraro mankas laŭ la kultura k politika vidpunkto; oni ne konstatas, ke la komunanoj celas altiri multe novajn homojn. Ne estas la sama fervoro, la samaj malkvietaj esploradoj, kiujn mi sentis k vidis en la komuno "Antaŭgvardio", pri kiu mi parolis antaŭ momento.

Tamen la profitoj de "La ruĝa Moskvo" estas grandaj, k en 10 jaroj ĝi povus multe fari. La membroj ne deziras studi la sperton k la efektivigojn de la aliaj bonaj komunoj en Sovetio. La homoj ne forlasas sian angulon k tute ne ekpensas pri tio, kio fariĝas trans la limoj de ĉi tiu.

Ĉiuj karakterizaj apartaĵoj de la ĉiutaga kamparana vivo ankaŭ konserviĝis. Ĉiu familio loĝas en sia aparta ĉambro kun ĉiuj propraĵoj posedataj: siaj mebloj, sia brokantaĵaro, k la tuta hejma komercaĵaĉo.

Laŭ vidpunkto de la task-disdivido ankaŭ estas nenio speciala, kio povus utili kiel ekzemplo por la kolĥozloĝantoj. Estas vere, ke en la komuno la disciplino estas energia k la tuta mastruma aktiveco malvolviĝas seninterrompe.

Tie ankaŭ la samaj plendoj pri la tuta manko de provizumo per industriaj produktoj. Neniom da sapo (oni ne ricevas sapon de post pli ol du monatoj); la infanoj estas trafataj de favo; la tolaĵo ne plu estas lavata.

La ejo, en kiu oni disdonas la komercaĵojn, estas malplena. Bona panfarejo, kie oni bakas belegan tritikan panon.

Necesas, ke la regiona direkcio koncentrigu sian atenton sur tiun komunon, ke ĝi sendu tien multajn funkciulojn por la kultura k politika aktiveco; necesas organizi centrojn por la infanoj, venigi tien frebelan instruistinon, partianon, kiu povus samtempe agadi inter la virinoj. Necesas bone organizi la komunan nutradon k la instruadon al komunanoj pri la kamparaj problemoj. Nur tiakondiĉe la komuno povos en sia regiono agi kiel fortega pioniro de la kultura revolucio, kiel kapabla organizanto, kiel gvidanto de l' kolektivig-movado.

Traduko de la Alĝera Esperantista Grupo.

[1] Instruanta laŭ metodo de l' pedagogo *Frebel* (Froebel). — *Red.*

Deklaro de la verkinto de l' artikolo "Ĉu Revolucio?"[1]

K-dino 11 576, parolante en la nomo de la Okcident-Londona Grupo de SAT-anoj[2], certe grandparte pravas k mi tre ŝatas la konvenan tonon en ŝia respondo. Estas nur domaĝe, ke ne ĉiuj diskutoj estas tiom kamaradectonaj.

Kiam mi parolis pri la delegitoj al Sovetio, mi certe ne intencis diri, ke ĉiuj delegitoj estas fiuloj, ne proletoj ktp. Mi volis nur paroli pri granda parto. En multaj sindikatoj oni proponis elekti kiel sendoton al Sovetio simplajn laboristojn; sed la dungitaj laboristoj ne povis akcepti tiun inviton, ĉar verŝajne post sia reveno ili ne plu trovus laboron. Por la senlaboruloj la sama neeblo sin prezentis. Ili devis vivi per subteno de registaroj k certe la registaro kontrolas la senlaborecon de la individuoj devigante ilin ĉeesti oftan kontrolon. Tute facile povis male akcepti la liberprofesiuloj, la sekretarioj de sindikatoj ktp.

Mi kredas verdiri rimarkigante, ke tre malmultaj indaj k laborantaj laboristoj (ne eks-laboristoj) vizitis Sovetion. Kaj demandante la laboristaron sovetian: "ĉu la Sovetia laboristaro scias, kiel estis uzita ĝia mono" mi rajtas respondi al ili, ke ne multaj simplaj laboristoj profitis en tiu mono, sed nur funkciuloj.

[1] Vidu n-on 324.
[2] Vidu n-on 331.



Redakcia adreso: A. SCHWARZ, Lerchenstr. 14 Neckarsulm (Germanio).

Tiaj ili estas

Al la samtitola artikolo en n-o 280 mi volas jenon respondi. La verkinto de l' artikolo rakontas aventuron, kiun li spertis kun samseks-amanto. Je la fino li mem esprimas, ke la tria sekso havu la saman rajton kiel la du aliaj k pledas por la malfeliĉuloj; tamen kelkajn liniojn antaŭe li nomas la viron monstro. MONSTRO! kiel ponarda piko trafas tiu esprimo ĉiun samsortanon de tiu samseks-amanto. Ĉu vi ĉiuj pli feliĉaj genormaluloj ne povas aŭ ne volas kompreni, ke tia "monstro" estas egala al ĉiu alia homo k nature havas sentkapablon ne monstran, sed homan kiel vi heteroseksuloj? Ĉu vi, verkinto, jam foje sentis vin monstro, se via normala seksa inklino pelis vin al virino amata, por karesi ŝin?

Jes, kio ĉe vi estas natura, ĉar bona sorto donis al vi la senton por la malsama sekso, tion vi simple nomas "monstraĵo" ĉe aliuloj, ĉar vi ne komprenas la teruran enigmon de la naturo, kiu metas en "tiajn" homojn la amon al la sama sekso.

Sed ĉu vi ne volas klopodi helpi al "tiaj" per komprenema konduto al ili? Ĉu vi ĉiuj ne jam foje facilanime ekridis aŭ almenaŭ indignite grimacis, se vi okaze aŭdis ion tian aŭ renkontis tiele suspektatan homon? Kiel facile do estas suspekti iun en tia afero k ankoraŭ pli facile disvastigi babilaĵon plej ofte kalumnian. Kiel klera homo meditema vi respondi devus en alia maniero al nepensemaj babiluloj, ol konsente rideti. Al tia homo la vivo, aŭ pli bone la vegetado, fariĝas senfina turmento, eĉ se neniu imagas pri lia sorto, tiom pli se ial lin trafas la suspekto, kiu kutime fulmrapide dispublikiĝas k kiu en la malpura fantazio de kalumniemaj homoj kreas plej abstraktajn imagojn, kiuj asertitaj de unuj estas kun vera ĝuo kredataj k plurakontataj kiel faktoj de aliuj.

Ofte preferas tiaj malfeliĉuloj, kiuj estas senkompate pelataj al malespero per abomenaĵoj de siaj sensaciemaj kunhomoj, libervole morti ol daŭrigi tian vivon. Kompreneble tiu ago poste estas komprenata kiel signo de kulpo pro la imagoj fantaziaj alkroĉataj al ili. Homoj kun tia animstato estas eksterordinare delikatsentaj k sentas ĉiun geston, kiun vi laŭ via opinio sekrete faris al via apudulo pri ili. Kontraŭe multaj emas publike montri sian spriton dum ĉeesto de "tia", mokante lin kaŝe kun maldecaĵoj. Mi rekomendas al vi, se vi nepre devas montri vian moralan indignon al tia homo, ke vi persone ataku lin antaŭ atestantoj — post tio li havos okazon defendi sin k vi havos la eblon pruvi al li la malmoralon. Tio estus honesta k hominda; krome plej ofte la vero montriĝus k la multaj mensogoj devus sin kaŝi tien, kien ili apartenas. Ĉiu bubaĉo povas de dorsflanko malice ataki, sed bonkaraktera homo malŝatas ataki embuske sendefendulon. Ke tiaj homoj plej ofte vivas tutĉaste, estas pruvite, k estas netakseble, kiom da amikeco ekzistas, en kiu la amo montriĝas purideale sen iu ajn seksa interrilato. Jen forta manpremo k profunda rigardo al amata okulparo donas al ili eron da feliĉsento, kiun heteroseksuloj ĝuas plenplene en seksa kuniĝo.

Ho, gelegantaro, ne kredu, ke la amo al la sama sekso estas io malofta. En ĉiuj rangoj k klasoj ekzistas tiaj homoj malfeliĉaj, kiujn burĝaj leĝoj vicigas inter la krimularo. Leĝoj, kiujn jam kontraŭbatalis konataj al vi gvidantoj el nia klaso, kiel ekzemple Bebel k. a. Tiu ĉiam estinta k daŭre ekzistonta problemo ne solviĝas per malnoblaj persekutoj, kiuj decas al la homaro el la epoko de sorĉistin-procesoj, sed ne al la el spiritaj noktoj leviĝanta nuntempa homaro.

Homo tia ne emas peti de siaj kruelaj persekutantoj kompaton aŭ komprenon pro sia sorto, kiun li devas senkulpe suferi, sed kiom dankema li estas al homo, kiu el propra sperto konvinkiĝis pri la sambona moralo de tiaj, kompare al aliseksaj homoj. Neniu povas scii, ĉu ne amiko, kiun li mem ŝatas pro liaj bonaj ecoj, estas "tia", ĉu frato aŭ alia parenco aŭ konato, kamarado portas kaŝite en sia koro tiun sorton. Ĉu vi per senpripensa kondamna eldiro deziras ofendi ilin? Ne, Gek-doj! tion vi ne faros. Kiom da fervoraj batalantoj vi perdus, kiuj en niaj vicoj serĉas forgeson pri sia sorto, duoble aktive laborantaj, batalantaj por vi. Batalu por ili — aŭ almenaŭ ne kontraŭ ili. *Tia.*

"Mian n-on, mian nomon mi ne povas citi, escepte se mi havus la ideon memmortigi min. Se vi ne riskas la publikigon de la artikolo, metu ĝin trankvile en paperujon k la normala homaro boju plu kontraŭ "tiaj", kiuj kreskis, naskiĝis el ĝia propra rondo, anatemu plu, moku pri ni — k tiele pri vi mem, ĉar ni estas naskitaj k kreitaj de genormaluloj."

Kara, nekonata K-do. Tre multan dankon pro via responda artikolo, kiun ĵeti paperujon ekzistas nenia motivo. Mia artikoleto neniel celis ofendi iun. Ĝi estis rezulto de subjektiva sperto. Mi spertis, ke tiu persono ne volis al mi helpi pro amo, sed simple profiti el mia senhelpeco k fremdeco. Tial la vorto monstro. Sed mi ne kontentis pri mia sperto. Mi petis objektivan, sciencan klarigon. Mi mem serĉis en ĉi-temaj libroj. Prof. Th. Lesing (Lessing) klare elmontras en la libro pri Harman ("Haarmann"), ke ĉefe la nekompreno k malamo de l' homoj pelis Harman al krimoj, ja, la rifuzo de amo instigis lin pereigi sian pli malpli nekulpan kunulon. — Cetere, tre necesas trakti la seksan problemaron aktualegan por la gejunularo, sur "J. P."; ĉi-rilataj artikoloj de kompetentaj fakuloj baldaŭ aperos. (A. S.)

Kaj kiel tiu mono estis elspezita en Sovetio de tiuj homoj? Se mi dirus mian tutan scion pri tiu afero, mi naskus tro malsaĝan polemikon; la sovetaj K-doj mem scias, ke la diversaj datrevenoj (ĉefe la X-a) de l' revolucio estis kaŭzo por okazigo de vastaj festaranĝoj larĝe partoprenitaj (grandkoste) de la eksterlanda ĉeestintaro. Sed eble la laboristoj sovetiaj ne povis partopreni la festenojn aŭ atingi la diversajn drinkejojn, kie satiĝis la respektindaj delegitoj. *L. Berĵje (630).*

Scio aŭ volo?

Dum mallonga tempo mi legis sur ĉi tiuj paĝoj pri du popol-altlernejoj, la burĝ-demokrata en Drajsigaker k la socialdemokrat-sindikata en Harislefeld. Ekzistas ja ankoraŭ pliaj (Tinc, Direnberg, Helsinger, la "Akademio de l' laboro" en Frankfurt ktp.).

"Tial pli da lernejoj!" finiĝis la artikolo pri Harislefeld. Estus pli bone demandi: "Ĉu sufiĉas tiuj ekzistantaj lernejoj?" "Ĉu ili progresigas la revolucian movadon, ja eĉ nur la laboristan movadon?"

Estas ofte citata eldiro: "Scio estas potenco!", sur kiu estas bazitaj tiuj lernejoj. — Certe estas necese, ke revoluciuloj k perantoj de l' laborista movado posedu bonan scion pri sociologio, ekonomio k politiko (etiko ja ne estas estimata, — tamen mi opinias, ke ĝi estas tre grava kultura potenco de l' ekspluatatoj). Scion ili ja bezonas por povi ekkoni klare la sociajn aferojn, ĉu politike, ĉu ekonomie, ĉu kulture, por analizi trafe la okazaĵojn; ankaŭ ili ja devas scii pri la plej taŭgaj rimedoj por batali kontraŭ kapitalismo k ties helpantoj, klerikalismo k militismo.

TRA ESPERANTIO

KOMUNIKO DE LA PLENUM-KOMITATO DE SAT

Ĉe la praktika apliko de la gvidlinioj konigitaj en n-o 329 de "S-ulo" pri aktiva membreco en SAT, montriĝis necese fari kelkajn pliprecizigojn. Ni atentigas do pri jeno:

La fundamenta motivo por la nova formo de l' paragrafo 4-a de la Statuto (deviga abono al "S-ulo" por aktivaj membroj), kiel ĝi estas akceptita de la Kongreso en Lajpcig k konfirmita de la ĝenerala voĉdono en 1930, estis doni la rajton voĉdoni, sekve partopreni en la gvidado de l' Asocio, nur al tiuj K-doj, kiuj per legado de la oficiala organo estas informitaj pri la vivo de l' organizo. Konsiderante la fakton, ke troviĝas malnovaj membroj, kiuj pro ekonomia mizero nekapablas renovigi sian a k t i v a n membrecon (kotizo kun abono), estas konsentite al ili ebligi per favorkondiĉo konservi sian aktiv-membrecon (vd. n-on 329). Tiuj K-doj escepte k provizore restas aktivaj, kvankam ili ne ricevas la gazeton. Ni supozas, ke tiuj aktivuloj, ĝuantaj la favortarifon, ĉe aliaj lokaj abonantoj prunteprenos la gazeton por informiĝi pri la stato de nia movado.

Bazante nin sur tiu principo, ni kompreneble ne povas konsideri, ke n o v - aliĝantoj estu a k t i v a j membroj, se ili ne pagas la plenan kotizon. Novaliĝantoj estas konsiderataj kiel aktivaj nur, se ili estas membro-abonantoj. Aliel agi signifus kontraŭi la spiriton mem de l' paragrafo pri aktiva membreco.

Ni havas ekzemplojn, ke opoziciaj K-doj provas aligi al SAT personojn, kiuj eĉ ne scipovas esperanton, k petas, ke oni konsideru ilin kiel aktivajn sen abon-devigo! . . . Al tiuj estu dirite, ke ni ne lasas nin trompi de iliaj ruzaĉoj. Ankaŭ ni rezervas al ni la rajton nuligi la aktivan membrecon de K-doj ĝuantaj favortarifon, se ni ricevas informojn kun plendoj ktp. pri misuzo de tiu favorrajto.

Sed por tio estas necesa ne nur scio, sed ankaŭ juĝkapablo; k juĝkapablo estas pli grava ol la nura scio! Ĉu la supre nomitaj lernejoj havigas al siaj lernantoj tiun juĝkapablon?

Mi jam konatiĝis kun multaj lernantoj el tiuj lernejoj, lernantoj de plej diversaj profesioj k el multaj lokoj. Preskaŭ ĉiam estis la sama aspekto; ili sciis multon, ili scipovis bone paroladi, ili posedis firman evoluan teorion, sed ili ne havis sendependan juĝon pri la socia situacio, tiom malpli memstaran pensadon pri taŭgaj batalrimedoj. Ja, nur tro ofte ili estis nerevoluciuloj, sed homoj plenigitaj je konscio pri sia scio, pri sia supereco k sia estra kvalifiko. Estas la supertakso de nura scio, kiu kaŭzas tiajn efikojn, ĝi ankaŭ kaŭzas, ke tre ofte la simpla partiano perdiĝas en respekto antaŭ la K-do doktoro; ĝi kaŭzas, ke la laborista movado estiĝas pli k pli afero de karieristoj. Vole-nevole la supraj lernejoj favoras tian iluzion. *(16 900)*

(Finota.)

Kial SAT ne ricevas sian monon el Sovetio?

CK SEU persiste disvastigis kiel pretekston, por motivigi nepagon al SAT de l' ŝuldata monsumo, la fantazian aserton, ke pro momentaj ekonomiaj malfaciloj en Sovetio neniaj sumoj povus esti transpagataj eksterlanden, eĉ ne al *Ruĝa Helpo* ktp. Ni tuj atentigis pri la fakto, ke transpago de sumeto da 12 mil germ. mk., konsiderante la ĝeneralan buĝeton de USSR (la financplano por 1931 de Sovetio entenas 31 918 milionojn da rubloj da enspezoj k 30 418 milionojn da rubloj da elspezoj!), neniel povus ĝeni la normalan funkciadon de l' sovetia ekonomio. Ĉiu inteligenta persono vidas la ridindon de tia aserto! Por malgranda organizo kia SAT tamen 12 mil markoj signifas vivdemandon.

Nun iu fidinda K-do komunikas al ni jenan fakton: "La sindona sekretario de *l' Internacio de Eduklaboristoj,* K-do Vernoŝe (Vernochet) — nomita en p. 40 de nia Jarlibro — respondis al tiurilata demando de nia K-do, ke *el Moskvo estas transpagataj al li en Parizon por la organizo ĉiumonate proks. 8—900 dolaroj* (ĝis pasinta aŭgusto estis 1100 dolaroj)."

Notu tiun fakton, Gek-doj, k respondu kiel decas al tiuj, kiuj volas rifuĝi post la ŝirmon de suprenomita preteksto. La vera motivo por nepago estas tiu, ke SAT estis denuncita ĉe la Moskva Instanco kiel "flaveta", sekve detruenda organizo.

Kiel jam sciigite en la n-o 320 de "S-ulo", sekve de la klopodoj de nia presejo en Lajpcig, kies aŭtoritato k bonaj rilatoj kun la Moskvaj instancoj estas konataj, ĉi tiu sukcesis ricevi el Moskvo 1000 germ. markojn je 3. 11. 1930. Kaj estis promesite, ke ekde januaro 1931 povos esti sendataj 1000 markoj ĉiumonate. Kiel ni jam publikigis, ĝis la 13. de februaro nia Adm. ne ricevis eĉ unu kopekon. Kredeble tio rezultas de la agado de CK de SEU, kiu per cirkulero al grupoj[1] instigis, ke ili voĉdonu rezoluciojn petantajn, ke mono ne estu sendata al SAT.

Ne ricevinte monon, ni ree komisiis al la Direktoro de nia presejo en Lajpcig, ke li klopodu denove ĉe la koncernaj instancoj. Ni esperas, ke tiuj klopodoj sukcesos k ke tiel ni savos almenaŭ parton el nia mono.

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

Ni komencu nian gazetkronikon ĉe la religiuloj. "Katolika Vivo", aperanta depost januaro ĉiudusemajne apud "Espero Katolika", raportas multe pri atakoj al la katolikismo k ĝiaj reprezentantoj en Sovetio k Ĉinio. Sed anstataŭ indigni pri la "komunistaj ekzekutistoj", ili prefere rigardu sian propran vizaĝon en la spegulo, veku la konsciencon de l' reprezentantoj de dio en tiuj landoj, kie regas la katolikismo. La gazeto mem pledas, raportante pri kontraŭreligia agado en Nederlando, por nuligo de pres- k parol-libero en tiu lando! Nenia dubo ebla pri la sinteno de tiuj uloj, se ili havus la tutan povon!

"Oomoto-Internacia" (septembro/oktobro 1930) reprezentas, same kiel ĉiuj aliaj eklezianoj, la vidpunkton, ke la *konstruado de nova katedralo* signifas civilizan progreson! Nenio nova do! En artikolo "Neŭtraluloj k neneŭtraluloj" ni trovas jenan konstaton: "Fakto konvinkas pri ĉi tio lasta (nome ke landaj neŭtralaj esp. organizoj estas plej taŭgaj aparatoj por sendanĝerigi la vojon al oficiala alpreno de esp-o en lernejoj k tial devas esti fortigataj): sperta, kompetenta samideano de USSR ĉeestis la Universalan Kongreson de Esperanto en Dancig k sciigis pri la granda soveta esp. movado k pri la granda helpo de la soveta registaro al esp-o, ke la registaro tute bone konsciis utilon de esp-o k neceson ĝin oficialigi por instruplano de la lernejoj, sed la registaro ne decidis oficiale pri la lingvo *por eviti, ke la malamikaj registaroj juĝu esp-on lingvo de komunistoj k tial decidu kontraŭ esp-o . . .*" (La substreko estas nia — Red.) Ĉu ni bezonas diri, ke tiu oportunista "samideano" reprezentanta Sovetion ĉe la neŭtralula kongreso estis Drezen?

"Flandra Esperantisto" multe okupas sin pri "nacieco k internacieco". Citinte Masarik, kiu diris, ke "nacieco k internacieco ne estas kontrasto, sed harmonio . . ." la gazeto refoje (en feb. kajero) pravigas la flandran naciismon. S-ro Vermejlen argumentas:

[1] Vidu "S-ulo"-n n-o 323, pĝ. 87.

"Alta nacia kulturo ne plu povas ekzisti, kiam samtempe ĝi ne estas eŭropa. . . . Por esti eŭropanoj, ni devas antaŭ ĉio esti **io** . . . Por esti io, ni devas esti flandroj. Ni volas esti flandroj, por iĝi eŭropanoj." (?!)

En "Esperanto" (Ĝenevo) de januaro ni trovas rilate al militokazo jenan respondon de prof. Ajnŝtajn (Einstein) al intervjuinto, en pli granda artikolo pri la socia idearo de tiu fama scienculo. Li diris: "Mi senkondiĉe rifuzus ĉiun rektan aŭ nerektan servon por milito (k provus konvinki miajn amikojn agi same) tute sendepende de iu ajn kritika opinio pri la kaŭzoj de milito."

"Balkana konkordo" estas nova neŭtrala gazeto por la Balkanlandoj, eldonata depost januaro en Sofio. La gazeto volas pace kunligi la ses popolojn balkanajn, kiuj suferas pro sia divideco. "La esperantistoj formos la kreantan kernon, kiu kiel lavango konstante kreskos, altirante novajn k novajn mediojn de la socio." Eble bonintencaj paroloj, sed ĉu ne troigo? Vidinte formalaperi pro manko de subteno plurajn balkanajn esp. gazetojn, kiuj aperis en nacia kadro, ni opinias, ke tiu ĉi komuna gazeto por la tuta Balkanio kreiĝis pli vere pro ekonomia neceso ol pro supra ideala motivo, kiu devas servi nur por maski la malforton de l' esp. movado en la unuopaj landoj de l' blanka teroro.

"Arbeiter-Esperantist" (Lab. Esperantisto, organo de GLEA) pli k pli kun ĉiu n-o atestas pri la efiko de l' "nova linio" en la asocio. Batalo kontraŭ la sennaciismon (en nacia lingvo!), kontraŭ la gvidantojn de SAT, k speciale kontraŭ K-don Lanti. Represo de parto el la mensoga artikolaro aperinta en la "Bulteno de CK SEU" (10/11). Decido de la plivasta estrar-konferenco kontraŭ la Gotenborgan Konvencion; k sekve — nenia propagando por SAT.

"Laborista Esperantisto" (Amsterdam), kiu aperas nun pli grandformate k preskaŭ tute holandlingve, preparas jam en la januara n-o siajn legantojn per pluraj atentigaj k instigaj notoj al neceso kunlabori ĉe la aranĝo de l' 11-a SAT-Kongreso.

N. B.

TRA LA MOVADO
KRONIKO

FRANCIO. Ĉe la Naturamika unuiĝo en Elzaso nia movado bone progresas. Dum la FEO-kongreso (paskon en Nancy) la sekcio de l' naturamikoj en tiu urbo atendos siajn elzasajn k sarlandajn sam-asocianojn por internacia renkontiĝo kun propaganda festo en la popoldomo, partopreno en la esp. kongreso k dutaga ekskurso. Dum pentekosto esp-istoj k naturamikoj renkontiĝos en la Sud-Vogezmontaro. Nova kurso por naturamikoj komenciĝis ĉi-monate en Strasburgo.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Esperanto. Primer Manual. Eldona Fako de K. E. F., Duran i Bas 8, *Barcelona.* Form. 10,5×15 cm. Prezo: 25 centimoj. 32 paĝoj. Elementa lernolibreto por katalunlingvanoj.

"Floretoj". Porinfanaj rakontoj tradukitaj de la "Vendreda Klubo" en Winschoten (Nederl.). Eld. J. B. Wolters' Uitgevers-Maatsch., Groningen-den Haag. 1931. Kun multaj kolorbildoj. Form 13×19. 64 pĝ. Prezo: 0,70 f. (hol. guld.).

Militrezistantoj en multaj landoj. Eld. La Internacio de Militkontraŭuloj. 11, Abbey Road, Enfield, Middlesex, Anglio. 92 pĝ. Form. 14×20. Prezo: 1/2 ŝilingo angla.

22-a Universala Kongreso de Esperanto. Oxford, 2.—9. aŭgusto 1930. Oficiala Dokumentaro. Aldono al la Kongreslibro. Eldonita de la Loka Kongres-Komitato. 100 pĝ. Form. 15×22. Prezo nemontrita.

Katolika Vivo. Dusemajna gazeto informa internacia. 1-a jaro, n-o 1 (4. 1. 31). Direkcio k Redakcio 22, Cours Albert I, *Paris-VIII.* Abonprezo: 40 fk. jare; por Francio 30 fk. Form. 30×43 cm. 6 paĝoj.

Tiu nova eldonaĵo de l' katolikaj esperantistoj atestas pri vigla laborado en tiuj rondoj. Celo de l' gazeto estas meti praktike esp-on je la servo de la internacia agado de l' katolikoj. "Espero Katolika" plue aperas kiel monata revuo. Krome la katolikaj eldonas "Skolta Heroldo" k "Katolika Junularo" — resume, la esp. movado disvastiĝas inter katolikaro.

Esperantista ŝirkalendaro por la jaro 1931. Eld. Heroldo de Esperanto, Brüsseler Str. 94, Köln, Germ. Form. de l' tuta kalendaro 23×32, de l' folioj 11×16. Prezo: 1,50 mk. g. — Ĝi entenas diversajn priesper. informojn, ĉefe kun reklamcelo; por ĉiu semajno estas unu folio. Loko por notoj ktp.

L'Economie Soviétique, Sa dynamique, son mécanisme, Lucien Laurat. 250 pĝ. Prezo: 15 fr. fr. Eldonejo: Librairie Valois, 7, place du Panthéon, *Paris.*

Tial ke la verko estas franclingva k ne rilatas al nia movado, ni ne povas ĝin recenzi k nur mencias, ke la aŭtoro estas konata SAT-ano.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Freie Presse, Strasbg., 6. 1., amasmanif. kontraŭmil. en Bern, Tolajo por novnaskitoj; *Neue Zeitg.,* München, 3. 1., problemoj de l' familio en Sovetio (sen mencio de fonto!), 31. 1., unu el multaj (Kurmanaev) (same sen mencio de fonto!).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Münchener Post, 23. 1., 24./25. 1., 26. 1., 28. 1., *Le Prolétaire,* Liége, 22. 11., *Sport & Socialisme,* Liége, 23. 10., 11. 12., *Le Jeune Pionnier,* Uccle (Belg.), n-o 1., *Régénération,* Paris, feb., *Travail,* Lyon, 31. 1. Signalen, Stokh., 29. 1., *D. Deutsche Eisenbahner,* Berl., 25. 1., *Gazeto de motorciklistoj* (Germ.), 1. 1., *Das freie Wort,* Berl., 11. 1. (1 favora k 2 malfavoraj artikoloj kun tre stulta supraĵa juĝo pri esp-o); *Volksblatt,* Boĥum, 4. 1., 10. 1., 12. 1., 13. 1., 14. 1., 15. 1. (parte tiuj notoj aperis ankaŭ en 5 aliaj gazetoj de la Rur-regiono); 19. 1., 26. 1., 28. 1., 31. 1., *Dortmunder Gen. Anzeiger,* 15. 1., *Westf. Volksztg.,* Boĥum, 31. 1., *Bochumer Anzeiger,* 31. 1., *Neue Zeitg.,* München, 8. 1., 16. 1., 22. 1., *The Labour Woman,* London, feb. (rubriko).

Peresper. materialon enpresis:

Neue Zeitg., München, 19. 1.

NIA POŜTO

5140. — Mi bedaŭrinde ne havas tempon por doni al vi la konsilojn, kiujn vi petas; mi ne estas dungito de SAT k sekve povas nur mian liberan tempon dediĉi al nia afero. Se vi sendus tre legeble skribitan manuskripton, k se la temo estus bone pritraktata, SAT ja principe povus ĝin eldoni. Honorarion ricevi ne esperu, al neniu ni pagis ĝis nun. Via "Tago" aperos. *E. L.*

16 602. — Via artikolo aperos.

F. Ullrich. — Momente mankas loko; sed okaze ni povus utiligi. *Red.*

LETERVESPERO

estas aranĝata de la skandinava laborista klubo en Rockford, Ill., Usono, la 24-an de marto, skribu multnombre. Ĉiu letero estos respondata. K-doj skribu al K-dino Sigrid Ahlander, 1014 — 11th Ave., Rockford, Ill. K-dinoj skribu al K-do Erick Beck, 1215 — 16th Ave., Rockford, Ill. Ĉiuj kovertoj estu markitaj B. A.

Halo, Odense vokas!

Por montri al niaj gelernantoj la grandan disvastiĝon de esp., ni aranĝos letervesperon la 29. 3. Pro tio la tutmondaj geesp-istoj estas petataj sendi PI, PK aŭ salutleterojn al la vicprezidanto de l' klubo: Ax. Andersen, Haŭgstedsminde, 295, *Odense* (Danio). — Ĉiuj ricevos respondon.

Avizo de Sennacieca Frakcio

Revenis leteroj el Germanio de Leipzigano k el Boreck, K-do G. S. Ŝajne estis en malsanulejo. Li tuj sciigu sian adreson por ricevi materialon. Dankon al div. amikoj k amikaj "malamikoj" por kritikoj k rimarkigoj. Neniu forgesu, ke la ordono ĉi-perioda estas: aliĝi al la Sennaciista Frakcio! Sekr. T. Veder, 24—29, Merchantstr., Astoria, N. Y. (Usono).

ENHAVO

	paĝo
Faŝista politiko en la "Libera urbo Dancig"	169—70
Sklaveco en la 20-a jarcento	170
Ĉu faŝismo en Danio?	170—71
Varb-konkurso	171
La klasbatalo tra la mondo	171—72
Hispanio — ĝia evoluo de 1923 ĝis hodiaŭ	172
La kolektivigo en USSR laŭ Fedor Gladkov	173
Deklaro de la verkinto de l' artikolo "Ĉu Revolucio?"	173—74
Junulara Paĝo	174—75
Tra Esperantio	175—76
Anoncoj	176

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)